Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Majo - Junio 2016 | n-ro 05–06 (1331-1332)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA




## VOĈDONU!

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

## Renversa Universo

Mi provis jam delonge, esprimi min per-verse
kaj kredis inon nepra al forto de inspiro
Sed tuj post la stariĝo en muz' de l' amatino,
Terure ĉio fuŝe funkcias tut-inverse !

Duone dias muzo, sed agas plendiverse :
Sub sia prema trudo, senĉese kun obstino,
Ŝi krude min verkigas ajniste sen vespiro
Per versoj kiuj ĉiam incitas plej perverse...

Kaj kiam por eskapi, ripoze mi prozumas,
Kun tuja ***koro*** ***rok***a, riproĉe l' ***muzo*** ***zum***as
Ŝtonece l' ***karbo*** ***brak***as, elektre l' ***pilo*** ***lip***as...

Fatrase, ĉiuj pecoj en siaj ***malo***j ***lam***as !
Ne ĉio tamen misas : malve ! plu ***mam***oj ***mam***as
kaj pro palindromemo, inversa ***piĉ***o ***ĉip***as...




Serge Sire
*"Perverse", SAT-EFK 2014*

Vidu ankaŭ Kontrepetraj rimoj – paĝoj 23-24



## *Printempa fido*

*Vekiĝis softe la aer'.*
*Ĝi flirtas, teksagas sur la ter'*
*kaj kreas verdon nun sen fino.*
*Ho, freŝodor', sonad' sen lim'.*
*Nun estu – koro – do sen tim'.*
*Turniĝi devos la destino.*
*Pli belas la mond' post ĉiu tag'.*
*Ne estas limo de l' imag'.*
*Floradas nun sen fino.*
*Floradas eĉ en fora val'.*
*Forgesu – kor' – pri via gal'.*
*Turniĝi devos la destino.*

Ludoviko Uhland
*Tradukis Cezar*

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen via gazeto unuafoje en tutkolora vesto! La evoluo de la presad-kondiĉoj ebligas ĉi tiun kvalitan plibonigon sen tro alta kresko de la presokosto, do la plenumkomitato decidis profitigi ĉiujn pri tio. Tiel jam dum la kongreso eblos ekbilanci pri tio, kaj pripensi kiel plej oportune utiligi ĉi-tiun novan eblecon.

Migrado el militzonoj daŭre restas kruele aktuala temo, kaj logike estas abunde traktita en la ĉi-monata temdosiero. Hazarde pluraj kamaradoj sendis ankaŭ kontribuojn pri la socipolitikaj okazaĵoj el mezoriento, kiuj ebligas pripensi ne nur la simptomojn, sed ankaŭ la pli profundajn kaŭzojn de la nunaj homaj movoj ĉirkaŭ Mediteraneo. Aldonaj artikoloj pri UN kaj rilatoj inter mondpotencoj donas eĉ pli vastan perspektivon.

Aldone al artikoloj pri Kubo, sindikatismo, ekologio kaj beletro, novaĵoj el du LEA-oj donas praktikajn ekzemplojn pri klopodoj disvastigi nuntempan laboristan literaturon pere de Esperanto.

Fine, en ĉi tiu numero aperas la jarraportoj de la PK kaj de la ĜK-aro, pridiskutotaj dum la venonta kongreso. Vi en ili trovos klarigojn pri la malfruo en la ekspedo de la numero 3-4 de Sennaciulo. Jen plia okazo rememorigi, ke la bonorda apero de la SAT-organo dependas de ĉies kontribuoj, ĉu pri la enhavo, ĉu pri la organiza flanko.

La Redaktoskipo

## *Venontaj limdatoj*

Sennacieca Revuo 2017: 31a de decembro 2016

Sennaciulo 9-10 (1335-1336): 20a de julio

Sennaciulo 11-12 (1337-1338): 20a de septembro

Frontpaĝa bildo de Diana Riŝar

# *Enhavo*


### Temdosiero: Migrado
4 Enmigrantoj amase sturmas Eŭropan Union Mir-Ko
7 IDOMENI Sen RODIN
8 Interŝanĝo pri atencotemo Michel MARKO
9 Deturni la rigardon NXC
9 Zamenhof pravis (3) Roger CONDON

### Mondpolitiko
12 De la mizero de la Unuiĝintaj Nacioj Lizas WELT
13 La malbonvola spirito Putin Sonja VAN DEN ENDE
14 Kubo: granda sukceso kaj malgranda malsukceso Santiago ALBA RICO
16 ELAM: Sano el Kubo por la Mondo Amparado CISNERO ROVIRA

### Sindikatismo tutmonda
17 Kolombio: Liberigu tuj la profesoron kaj sindikatanon Miguel Ángel Beltrán
17 Gambio: justeco por Sheriff Diba

### Historio
18 13 monde famaj Civitanoj de la Mondo alvokas Sendita de Mondcivitana Asembleo

### Ekologio - medio
19 Daŭripovo – Resilienco – Transformo (Superrigardo) Wolfgang GUENTHER

### Beletra angulo
2 Renversa Universo Serge SIRE
2 Printempa fido Ludoviko UHLAND
22 Kafka: Antaŭ la leĝo... Cezar
23 Karaj rimoj? Uwe STECHER
35 La flugo Miguel FERNÁNDEZ

### Tra Esperantio
25 La KancerKliniko Ĵak LE PUIL

### Intelekta Memdefendo
26 Enigmoj Serge SIRE

### El la LEA-oj
27 Hispana kritika poezio en Esperanto Miguel FERNÁNDEZ
28 Eta raporto pri la laboro de Sveda Laborista Esperanto-Asocio

### El la Leterkesto
33 Dosiero de Subjekto N-ro 1218 - Rakonto de Bulgara Anarkiisto

### El la SAT-administrejo
29 Tereza Kapista (1930-2016) Dimitrije JANIČIĆ
30 Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2015 ĝis Majo 2016
32 Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 2015-2016
33 Dumkongresaj laborgrupoj
34 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Preseraroj | Donacoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***